I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

N° 7 - 8 Julio kaj Aŭgusto 1961 11-a Jaro

## 32-a ITALA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO

### SANREMO (Italio) 23 - 28 Septembro 1961

PROVIZORA MAKSIMUMA PROGRAMO

Sabaton, 23-an de septembro 1961 ĝis la 24-a horo: Alveno de la Kongresanoj kaj disdono de la dokumentoj: AKCEPTEJO ĉe A.A.S.T. Horoj 18,30 - Konferenco por italaj kaj eksterlandaj ĵurnalistoj, ĉe Saloneto B (Kazino B). Horoj 21 - INTERKONA VESPERO kun muziko, dancoj, kantoj ankaŭ en Esperanto, ĉe Nokta Klubo (Kazino NK)

Dimanĉon, 24-an ĝis la 12-a horo: Disdono de la dokumentoj (Kazino S)
Horoj 9, - Katolika Diservo, kun prediko en Esperanto
" 10, - SOLENA INAUGURO DE LA KONGRESO EN LA TEATRO (Kazino T)
" 12, - Honora vermuto de la URBO SANREMO, en la granda SALONO DE LA FESTIVALO(Kazino F)
" 12,30 Ĝenerala fotografado, sur la ŝtuparego de Kazino
" 15, - Ĝenerala Asembleo de I.E.F. en la Teatro (Kazino T)
" 18, - Jara kunveno de la ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO (Kazino B)
" 21, - Publika Arta Vespero, kun kantoj ankaŭ en Esperanto (AUDITORIUM)

Lundon, 25-an. Skribaj ekzamenoj de Esperanto (III gradaj) A.A.S.T.
Horoj 9, - Daŭrigo de la laboroj de la Kongreso (Kazino T)
" 11, - Jara Kunveno de I.L.E.I. (Kazino NK)
" 14,30 Ekskurso al MONTO BIGNONE, 1300 metrojn (per ŝnurvojo)
" 21, - Kongresa Dancfesto "GALA DE ESPERANTO" (Kazino F)

Mardon, 26-an. Daŭrigo de la ekzamenoj de Esperanto A.A.S.T.
Horoj 9, - Daŭrigo de la laboroj de la Kongreso (Kazino T)
" 11, - Jara Kunveno de la Esperantista Junularo (Kazino NK)
" 14,30 Ekskurso al MONTO BIGNONE, 1300 metrojn (per ŝnurvojo)
" 21, - Publika Konferenco pri Esperanto kaj ĝiaj praktikaj atingoj (Kazino T)

Merkredon, 27-an. Fermo de la ekzamenoj de Esperanto A.A.S.T.
Horoj 9, - Jara Kunveno de Katolikaj Esperantistoj (Kazino NK)
" 10, - Daŭrigo de la laboroj de la Kongreso (Kazino T)
" 14,30 Ekskurso en la ĉirkaŭaĵoj de Sanremo, per aŭtopulmano, oferota de la Lokaj Instancoj kun akcepto ĉe la Golfo Klubo. Horoj 21,- Alia Publika Konferenco pri Esperanto k.t.p. kaj OFICIALA FERMO DE LA KONGRESO (Kazino T)

Ĵaŭdon, 28-an. TUTTAGA EKSKURSO. Horoj 7,30 Ekveturo per aŭtopulmano al la franca landlimo, daŭrigo al MONTEKARLO, vizito al la OCEANOGRAFA MUZEO. Horoj 12,- Daŭrigo de la ekskurso al NICE, renkontiĝo kun la lokaj samideanoj kaj komuna tagmanĝo. Horoj 16,- Revena vojaĝo al la Kongresa Urbo Sanremo. Horoj 19,30 Alveno kaj Salutoj!

N O T O J: La ekskurso al Monte Bignone (ekskurso A de la aliĝilo) kostos £. 1000 por la mendontoj ĝis la 31-a de Aŭgusto, poste ĝi kostos £. 1300.
La ekskurso al Montekarlo-Nice, inkluzive vizitoj kaj komuna tagmanĝo, kostos £. 2000 ĝis la 31-a de Aŭgusto, £. 2300 post tiu dato. (ekskurso B de la aliĝilo).

LOĜIGA SERVO: Ni informas la kongresanojn, ĉu italajn ĉu eksterlandajn ke la mendo de la ĉambroj (en hoteloj aŭ pensionoj) povas efektiviĝi pere de la A.A.S.T. de Sanremo, ĉiam indikante - ankaŭ propagandcele - ke temas pri nia 32-a Nacia Kongreso de Esperanto.

Bonvolu noti ke ne ĉiuj hoteloj konsentas la rabaton de 10 %, ĉar iuj el ili taksas tiun periodon kiel alta sezono. Pro tio estas konsilinde mendi la ĉambrojn pere de nia A.A.S.T., indikante du aŭ tri hotelojn inter kiuj nia Turisma Oficejo elektos iun kiu konsentas la rabaton. Krom hoteloj kaj pensionoj ekzistas ankaŭ gastejoj (itale Locanda), kiuj estas iom pli malmultekostaj, kelkaj el ili konsentas ankaŭ la rabaton 10 %.

Do, bonvolu mendi ĉambrojn kaj pensionon, aŭ nur ĉambrojn, aŭ duonpensionon, laŭ viaj deziroj, sed ĉiam pere de nia A.A.S.T.

Pri la membrokarto, ni informas la kongresanojn ke ĝin ricevos ĉiuj je sia alveno al Sanremo, ĉar ĝi estos presita multkolore, en granda formato (8x10 cm.), kiel samtempa distingilo de la Kongreso, kun la nomo kaj la urbo de la kongresano: tia estas la plej moderna modelo en la plej evoluiĝintaj nacioj.

Bonvolu atente tralegi la programon, ĉar ĝi enhavas la kostojn de la ekskursoj, kiuj plialtiĝas post la 31-a de aŭgusto.

Je la alveno en Sanremo, bonvolu informiĝi pri speciala rabato sur fadenbuso urba, kiun ni atingis de la loka firmao S.T.E.L., valida de la 24-a ĝis la 27-a septembro, nur por la kongresanoj. La urba fadenbusa linio iras de Villa Helios al La Brise. Sur tiu linio ni atingis specialan karton, je 200 lirojn, por la tuta kongresa periodo (posttagmeze de sabato ĝis la tuta 27-a septembro). Tiu linio sekvas la vojojn: Marconi - Matuzia - Imperatrice - Stacidomo - Roma - Place Colombo - Garibaldi - Cavallotti. Reo ĝi sekvas la samajn vojojn escepte en la centro, kie ĝi eniras la Corso Matteotti, anstataŭ via Roma. Do vi povas elekti loĝejon en la centro, aŭ for de ĝi, en pli trankvilaj lokoj.

Por la mar-amantoj ni konsilas la orientan parton de la urbo, kie la akvo estas hela, kaj ne tre vizitata. Sed aliaj lokoj estas, kun bela sablo, iom dissemitaj sur la tuta marbordo de Sanremo.

La Sekretario de la Kongreso: Ing. G. Caraffa

## INVITO DE LA ESPERANTISTOJ DE TORINO

La gesamideanoj de Torino kaj de la tuta Piemonta Regiono, afable invitas ĉiujn italajn esperantistojn kaj, unue, la eksterlandanojn partoprenontaj al la 32-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto kiu okazos en Sanremo 23/28 septembro 1961, viziti belan Torino-n kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn okaze de la gravaj solenoj por la Unua Centjaro de la Itala Unuiĝo.

La Kunveno okazos dum la tagoj sekvontaj la fermon de la Kongreso en Sanremo kaj, nome, la 29/30-a de septembro. La interrenkontiĝo, tre interesa vidpunkto de nia lingva propagando, donante la eblecon aŭdi famajn oratorojn, kaj ĉeesti tre interesajn renkontojn kaj disputadojn, obligos ĝin du tagojn amuzfrateoplenajn inter la samideanoj de ĉiu lando viziti la belegajn ekspoziciojn organizitajn okaze de la solenoj pri la Centjaro, jen en aparta enhavaĵo, jen en diversaj palacoj, inter kiuj okupas gravan postenon la Historia Ekspozicio en Palaco Carignano; kaj enhavos ankaŭ viziton al Aŭtomobila Muzeo kaj sinkonkludos per komuna vespermanĝo en karakteriza restoracio. Oni esperas, en tiu ĉi okazo, inaŭguri straton aŭ ĝardenon nomota "Esperanto" aŭ "Zamenhof": pri tiu celo, estas traktado ĉe Komunumo.

La aliĝoj al Kunveno estas tute senimpostaj. Al postulontaj gesamideanoj estos sendata ilustrita gvidlibro de Torino kun la plano de la urbo kaj de la zonoj de la Ekspozicioj. La gvidlibro enhavas ankaŭ la urbturisman priskribon en esperanta lingvo kaj la difinan programon de la manifestacioj. Oni provizos antaŭmendi loĝejon por kiu, ĝustatempe, petus ĝin sciigante deziratan tipon, rilate la prospekton ĉi sube indikita. Por informoj skribi al Esperanta Grupo de Torino, via Maria Vittoria n° 21.

PROVIZORA PROGRAMO: Ĵaŭdo 28/9: 21-a h. ĉe "CAFFE' LERI" C. Vitt.Emanuele 64, renkontiĝo

Vendredo 29/9: 10-a h. en la salono de la Aŭtomobila Muzeo, C. Polonia 140, inaŭguro de la Kunveno. 11-a h. kunveno de la Katedroj de Esperanto. 12-a h. tagmanĝo "varma tablo". 15-a h. vizito al la historia centro de la urbo. 20-a h. komuna vespermanĝo.

Sabato 30/9: 10-a h. vizito al la Ekspozicio "ITALIA '61", libera tagmanĝo kaj ekskurso sur rivero PO per boato. 16-a h. inaŭguro de strato aŭ ĝardeno.

Proksimumaj prezoj por tranokto: I-a Klaso 1lito £.2000, 2litoj £.3600; II-a Klaso 1lito £.1600, 2litoj £.2600; III-a Klaso 1lito £. 1200, 2litoj £.2000; IV-a Klaso 1lito £.1000, 2litoj £. 1500; Turismaj restadejoj 1lito £.850, 2litoj £.1800; Esperanta pensiono toj £.1000.

La ORGANIZA KOMITATO

## LA LARĜA ŜPURO EN HISPANIO

Ĉiu kiu fervoje venas Hispanion, devas transtrajniĝi ĉe la landlimo franca-hispana, tiel spertante la ŝpurdiversecon. La normala ŝpuro havas sian originon en Britujo, kie la parlamento dum 1847 dekretis la ŝpuron de 4 anglaj futoj 8½ coloj (aŭ 1435 mm.), kiun Stephenson uzis por sia unua lokomotivo, deviga mezuro por ĉiuj novkonstruotaj fervojoj.

La plej multaj eŭropaj landoj adoptis tiun saman ŝpuron, aliaj iniciatis proprajn esplorojn kaj poste elektis pli larĝan ŝpuron: Ruslando 1524 mm, Irlando 1660 mm, Portugalujo 1665 mm, kaj Hispanio 1674 mm, t.e. 6 kastiliaj futoj.

Hispana inĝeniera komisiono argumentis ĉefe, ke la larĝŝpurajn lokomotivojn, oni povas konstrui pli efikajn, kaj la grandaj niveldiferencoj inter la diversaj partoj de Hispanio postulas efikajn trakciilojn. La unuan fervojlinion en Hispanio oni inaŭguris en 1848, ĝi estis 30 km. longa kaj kondukis de Barcelono al Mataró.

Laŭ la nuna situacio, la mezeŭropa normalŝpura fervojreto ampleksas 250.000 km.; oriente de ĝi situas 125.000 km. da larĝŝpuraj linioj en Sovet-Unio kaj Finnlando kun 89mm. pli larĝa ŝpuro; sudokcidente aliĝas la 13.000 km. longa reto de Hispanio, kies ŝpuro estas 239 mm. pli larĝa ol la normala ŝpuro. La ŝpurdiferenco inter Portugalujo kaj Hispanio estas tiel malgranda, ke la vagonoj povas transiri. La insulo Irlando havas sian propran ŝpuron.

Ĉe la transirpunktoj inter malsamŝpuraj retoj necesas kapstacio kun instalaĵoj por ambaŭ ŝpuroj. En tiu stacio ĉiukaze estas ankaŭ dogankontrolo. La pasaĝeroj devas transtrajniĝi, la varojn oni devas transŝarĝi per manlaboro. Tio grave malhelpas la trafikon pro kostoj kaj tempoperdo; la varoj perdas sian bonkvaliton, precipe la delikataj hispanaj fruktoj elvaporiĝas kaj velkas.

Favore al la pasaĝeroj teorie eblas instali trian relon de la landlimo ĝis proksima grandurbo por ke normalŝpuraj vagonoj povu veturi ĝis tie, sed pro la kostoj tia plano ĝis nun ne estas realigita. Por venki la malhelpon de la vartrafiko ekzistas du solvoj: aŭ la vagonkestoj ricevas ĉe la transirloko alian rulmekanismon, aŭ la vagonoj devas havi ŝpuradapteblan rulmekanismon. La laste nomita solvo restis ĝis nun eksperimento, sed la interŝanĝado de radaks-kompletoj estas praktikata kun bona rezulto, kaj ĉe la orienta larĝŝpuro kaj ĉe la franca-hispana landlimo. Tie, en Hendajo kaj Cerbero, oni suprenlevas la vagonkeston, interŝanĝas la radaks-kompletojn, adaptas la bremsblokojn, kaj ree mallevas la vagonkeston. Post 8 minutoj la vagonoj povas ruliĝi sur aliŝpura reto. La instalaĵojn en Hendajo kaj Cerbero instaligis la privata entrepreno TRANSFESA en la jaro 1951. Ĝi ankaŭ posedas la necesajn specialvagonojn, preskaŭ 2000. La transportvolumeno rapide kreskis per tiuj duetaĝaj ŝarĝvagonoj. En 1951 oni transportis 4000 tunojn, en 1959 estis jam pli ol 300.000 tunoj. Per tiu fervojtrafiko Hispanio iom post iom regajnas siajn vinbermerkatojn en Eŭropo, perditajn pro la Civila Milito. Ankaŭ al la ŝiptransportado inter Hispanio kaj Britujo la TRANSFESA-transportoj povas konkurenci. La lastatempe enkondukita seninterrompa tarifo ebligas al importanto ie en Eŭropo precize kaj facile antaŭkalkuli la transportkostojn de vagonŝarĝo el Hispanio ĝis la celstacio.

La diversaj ŝpurŝanĝaj proceduoj havas tre malsimilan efikecon. Se oni transŝarĝas la varojn, la laborpovo de unu viro estas maksimume 1,7 tunoj pohore, ĉe la interŝanĝado de radaks-kompletoj unu viro atingas laborpovon de maksimume 7,5 tunoj pohore, kaj laŭ la eksperimentoj per ŝpuradapteblaj radaksoj unu viro povas atingi laborpovon ĝis 80 t.p.

Fine menciende estas ke apud larĝa kaj normala ŝpuroj ekzistas mallarĝaj ŝpuroj, aplikataj por neĉefaj linioj kun malmulte da trafiko, ĉar tiaj linioj postulas nur malpli altajn kostojn. (resumo pri la fakprelego farita okaze de la 13-a IFEF-Kongreso en Barcelono

## U.E.A.-KONGRESO 1962 EN KOPENHAGO

Oni elektis L.K.K. de la 47-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, kiu konsistas el 16 gekomitatanoj plus 27 helpantoj. Prezidanto estas D-ro P.Neergaard, vicprezidantoj estas eksministro Søren Olesen kaj prezidanto de KKK S-ino Kirsten Zacho. Henning Olsen respondas la fervojistajn aferojn, kaj li jam kontaktis D.E.F.A.-instancoj kaj D.E.F.A.-anoj, kiu laboras ĉe D.S.B.-administracio por helpe de ili solvi sian taskon.

STOKE-ON-TRENT URBO DE LA 15-a I.F.E.F.-KONGRESO DUM 1963, nun eldonas faldfolion Esperatlingve; se iu deziras ekzempleron bonvolu skribi al la redaktoro de "JEN": S-ro H. BARKS 25 Mars Street, Smallthorne, STOKE-ON-TRENT, Staffs. (Britujo).

X-a Kongreso de Universala Movado pri Monda Konfederacio - Vieno- 10-15 julio 1961

## KIUN STRATEGION POR LA PACO!

Tri proponoj de la italaj "Mondcivitanoj"

UNUA PROPONO: Plifortigi mondcivitanismon per:

a) Starigo de forta tutmonda direkcio kapabla konkrete gvidi la naciajn mondcivitanajn fortojn.

b) Solena proklamado de la neceso por ĉiuj Mondfederalismaj Asocioj, preter apartaj konsideroj, aliĝi al unu tutmonda rondo.

c) Uzado inter M.C.(mallongigo de mondcivitanoj) de unika lingvo.

d) Eldonado de oficiala presaĵo reprezentanta la internacian Mondcivitanismon, dissendonda ĉiulandon en du lingvoj: Esperanto kaj nacia lingvo.

DUA PROPONO: Prizorgado de la necesaj iniciatoj por disvastiĝo de Mondcivitanismo ĉiulande speciale en Rusujo kaj Usono, aktualaj tutmondaj gvidfortoj.

TRIA PROPONO: Propono al la tutmondaj registaroj komencigi starigon de Mond-konfederacio komencante per konstituado de Mondlingva unuiĝo inter tiuj nacioj kiuj estas tuj pretaj ĝin partopreni. Mondlingva unuiĝo konsistas el tiuj nacioj kiuj deziras adopti interrilate unikan helplingvon, tiucele ESPERANTO ŝajnas al ni konsilinda.

el "IL DOMANI" Mondcivitana Gazeto

## "JUGOSLAVIA FERVOJISTO"

Monata fervojista Esperanto-revuo, estas organo de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE). Tiu ĉi bela revuo aperas jam ses jaroj regule monate, kaj ek de la numero 5/1961 ĝi estas presata, sur bona papero, riĉe ilustrita, sur 24 paĝoj + kovrilpaĝoj en granda formato. Krom la fakaj kaj primovadaj rubrikoj, ĝi enhavas ankaŭ jenajn rubrikojn: "El fremdaj fervojoj", "Ekkonu nian landon", "Ekkonu la mondon", "Nia rakonto", "Fakaj terminoj", "Humoro", k.t.p. Pere de ĝi vi povas konatiĝi kun la socipolitikaj, ekonomiaj kaj kulturaj novaĵoj el Jugoslavio. Estas menciinde ke ek de la numero 1/1962, ĝi publikigos en daŭrigoj "Historion de Esperanto-movado en Jugoslavio" de konata publicisto kaj verkisto Marinko Ĝivoje.

Ni alvokas vin abomi tiun ĉi interesan kaj varian revuon rekte ĉe la eldonanto, uzante devizan konto-kuranton por eksterlando; 400-11-31806-250-1505,"Jugoslavia Fervojisto" Zagreb, Mihanoviĉeva 12, Jugoslavio, aŭ ĉe nia sekretario: G.Gimelli, Via Donato Creti 61 Bologna (Italujo). Jarabono por eksterlando estas 1 dolaro, aŭ egalvaloro.

## ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 ROMA (Italia) - La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.) - Ondlongoj: metrojn 30,90; 41,24 kaj 50,34.

DISSENDOJ EN ESPERANTO JARO 1961-a - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.

Septembro 1961-a - vendredon la 1-an: La fama napola kanzonverkisto E.A.Mario - mardon la 5-an: Tra la literaturo - vendredon la 8-an: Giuseppe Airoldi, inventinto de la krucvortenigmoj, okaze de la centa naskiĝa datreveno - mardon la 12-an: "La nomo de Maria", religia himno de A.Manzoni - vendredon la 15-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 19-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 22-an: Novaĵoj el Italujo - mardon la 26-an: Tra Romo: Vojo Appia - vendredon la 29-an: Alberobello kaj ĝiaj "trulli".

Oktobro 1961-a - mardon la 3-an: Tra la literaturo - vendredon la 6-an: La spirito de la etruskaj tomboj - mardon la 10-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 13-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 17-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 20-an: Famaj fremdaj virinoj en Italujo: Paolina Bonaparte - mardon la 24-an: Kiel aspektis fizike Jesuo surtere - vendredon la 27-an: Latinaj verkistoj: Plinius Junior - mardon la 31-an: Tra Romo: Vatikanaj Ĝardenoj.

La fakestro: L.MINNAJA

PAROLAS VARSOVIO - Programo de la elsendoj en Esperanto.

Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage de la h.16,30 ĝis la h.17,- laŭ la mezeŭropa tempo duonhoran programon en Esperanto sur jenaj ondoj: metroj 25,09, 25,28, 25,42, 31,01, 31,45, 31,50, 42,11 kaj sur la meza metroj 249. Aŭskultu niajn konstantajn elsendojn.